



Komencanto

Kiel tio komenciĝis

Rakontas Jefim Zajdman,
konata esperanto-aktivulo el
Krimeo
Legendo pri Kniŝ

Verkoj de niaj legantoj

Poemetoj pri someraj
impresoj, originala fabelo
Originala novelo

Gramatiko serioze kaj ŝerce

Proverboj
por komencantoj
Prilingva eseo

Humuraj paĝoj

El historio de la ĝenro
Anekdotoj

La praktiko + la impresoj

Aventuroj de vojaĝanto

Konkurso

"Enigmoj-2006"

Korespondu!

korespondpetoj
kaj anoncoj



la bildon sendis Rjabcun Valentina [laskento, Uzbekio]

Adiaŭ, somero!

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

julio – aŭgusto

4 (60)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

UEA - Universala Esperanto-Asocio,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Viŝnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, a.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Esperable vi povis ĝui la bonegan someron kaj ĝi donacis al vi multajn neforgeseblajn impresojn. Lastaj tagoj de somero kaj komenco de aŭtuno, kiam klimato iĝas milda, simile al karesaj tuŝoj de veluro, havas poezian nomon "velura sezono".

"Velura sezono" estas ankaŭ nomo de populara arta Esperanto-festivalo en Krimeo, kiun iniciatis kaj dum pluraj jaroj gvidas Jefim Zajdman - nuna gasto de nia rubriko "Kiel tio komenciĝis". Multaj konataj E-artistoj iĝis laŭreatoj de "Veluraj sezonoj". Inter ili Ĵomart Amzejev, Mikaelo Bronŝtejn, Natali Berce, Vladimir Soroka, Mikaelo Povorin kaj aliaj. Jefim Zajdman estas ne nur konata E-aktivulo kaj organizanto de la artaj festivaloj, li mem verkas kantojn, eseojn, prozaĵojn. Vi povas legi en la revuo lian amuzan rakonton "Legendo pri Knis".

"Verkoj de niaj legantoj" okupas la centrajn paĝojn de "K", kaj vi renkontos ĉi tie jam konatajn al vi kaj tute novajn por vi nomojn. N.Neĉajev el Rusio kaj B.Sobol el Pollando sendis al la revuo poemojn, kiuj reflektas iliajn somerajn impresojn. Sur la najbara paĝo estas unua provo verki en Esperanto, farita de Luiza Carol el Israelo. Antaŭe ŝi verkis en la angla kaj rumana lingvoj kaj ŝiaj verkoj estis publikigitaj en multaj landoj. Aŭtorino de "La du edzinoj" Raita Pyhäälä el Finnlando jam estas konata al vi laŭ publikajo "Ĉe la manĝujo de birdoj". Ŝia nuna originala novelo pri la vivo kaj la amo de la homoj estas verkita same en bona lingvaĵo, ĝi kaptas vian atenton kaj vi nepre volas legi ĝin ĝis la fino. La verkistino tiom trafas pentras la karakterojn kaj la vivajn situaciojn, ke legante, vi mem kvazaŭ okazas inter la herooj.

La vican prigramatikan eseon "Proverboj por komencantoj" Jean'-Luko Tortel el Francio komencas ĉi-foje per la proverbo, apartenanta ne al L. Zamenhof, sed al Rajmond Schwartz, unu el niaj plej famaj E-verkistoj, kiu brile posedis humuran literaturan ĝenron. Kiel ĉiam la gramatikaj esploroj de J-L. Tortel estas facile legeblaj, klaraj kaj klerigaj. Legu kaj ĝuu!

Betti Chatterjee el Danio debutas en "K" per eseo kun ironia titolo "La avantaĝo paroli angle", en kiu ŝi sprite traktas la temon surbaze de la persona sperto.

Sur humuraj paĝoj vi povas iomete konatiĝi kun la historio de la anekdota ĝenro kaj trovos vican kolekton da anekdotoj.

Du rubrikaj "La praktiko" kaj "La impresoj" estas denove unuigitaj kaj prezentas nian malnovan konaton, esperantiston kaj petveturanton tra la mondo Sergej Ĉikaĉev, kiu debutis en "K" en 2003. Dum pluraj monatoj li vojaĝas petveture tra diversaj landoj kaj spertas ĉiuspecajn aventurojn. Lia nova vojaĝ-itinero estas Sud-Orienta Azio. Ĉi foje li trafis tute sovaĝan ĝangalon en Malajzio.

La vicajn taskojn de la konkurso "Enigmoj-2006" kaj pormomentajn ĝiajn rezultojn vi trovos sur la antaŭlasta paĝo. Sur la dorsa kovrilo vi vidos emblemon de la 92-a UK en Jokohamo. Eble venis jam tempo plani somerajn feriojn 2007.

Ĉion al vi bonan kaj agrablan legadon!

Komencanto

2006 numero 4 // (60) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2007:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Ekатеринбург, аб. ящ. 132.

vaste konata Esperanto-aktivulo el Krimeo (Ukrainio), unu el pioniroj de Sovetia Esperantista Junulara Movado, fondinto kaj multjara gvidanto de Esperanto-klubo en Jalta (ripozurbo en Krimeo), instruisto, tradukisto, dum lastaj jaroj esploranto pri agado de E-pioniroj. Fondinto kaj animo de la fama internacia arta E-festivalo "Velura sezono", aŭtoro de multaj popularaj E-kantoj.

Dum lastaj 44 jaroj de la aktiva agado Esperanto fakte estis por mi vivmaniero

En 1957 en Moskvo okazis Internacia festivalo de junularo kaj studentoj. Ĉar al la festivalo aliĝis ankaŭ esperantistoj el diversaj landoj, la registaro decidis montri, ke en Sovetunio Esperanto ekzistas kaj permesis anonci pri ĝi en ĵurnaloj. Tiel post 20 jaroj reaperis malnovaj esperantistoj, kiuj ĝis tiam timis elŝovi la verdan nazon. Iuj el ili - el ekzilo kaj malliberejoj.

En tiu tempo mi estis studento de matematika fakto de universitato en granda ukrainia urbo Ĥarkov. Iun tagon, vagante tra la urbo, mi ekvidis surmure anoncon. Oni proponis lerni internacian helpan lingvon Esperanto kaj aldonis adreson por la kontakto. Mi tuj eksentis, ke estas io interesa kaj skribis tien. Responde oni proponis al mi organizi E-kurson en la fakultato, kion mi faris, kaj rezulte ĉ.20 studentoj eklernis Esperanton. La instruisto nomiĝis Kotelevcev (la nomon mi ne memoras). Li estis altstatura maljunulo, kiu similis faman rusan verkiston Maksim Gorĵkij. En 37-a jaro, kiam en Ĥarkov okazis arestado de E-aktivuloj, li estis fore oficvojaĝante, kaj kiam revenis, la planon pri esperantistoj oni jam plenumis kaj li restis viva. Li estis aŭtoro de malgranda E-lernolibro, kiun uzis por la instruado - rakontis la gramatikajn regulojn kaj ekzemplis - sufiĉe enuiga metodo. Rezulte la kurso finis nur mi, sed ankaŭ mi malmulton ellernis. Tamen mi prenis de li gazetojn "El nuntempa Bulgario", kie estis multaj korespondadrezosoj, kaj ekkorespondis.

Somere mi feris en mia naskiĝloko, fama ripozurbo Jalta ĉe la Nigra maro, kaj memoras, ke provis surplage instrui Esperanton al geamikoj, kvankam mem malbone sciis ĝin. Estis fama "degeltempo" de Ĥruŝĉov, kiam en Jalta unuafoje komencis aperi fremdlandaj ŝipoj kun turistoj. Mi havis eblecon praktiki la anglan. Reveninte al Ĥarkov, mi hazarde renkontis surstrate la instruiston kaj al lia demando pri Esperanto facilanime respondis, ke okupiĝas nun pri la angla -



tranĉilo koren al tiu maljunulo. Poste mi eksciis, ke li estis ege malsana, kiam instruis al ni Esperanton, kaj baldaŭ mortis pensanta, ke lia lasta E-kurso estis tute vana. Tial mi ofte sentis kulpon, ke ne pravigis lian esperon, kaj estonte, kiam mi iĝis bona esperantisto, tio ĉiam instigis min aktivi.

Post fino de la universitato studentoj de nia fakultato estis devigitaj dum du monatoj ekzerci en militendaro. Mi memoras, ke tie mi prelegis pri Esperanto kaj rezulte du serĝentoj ekdeziris lerni la lingvon. Mi petis ilin de tempo al tempo aperi dum la militekzercado kaj "ŝteli" min je iuj pretekstoj por ke mi kaŝe instruu al ili Esperanton. Mi estis feliĉa fuĝi de la ekzercoj. Sed mi ĝuste memoras, ke povis instrui nur 200 vortojn - tia estis tiam mia vortprovizo. Mi restigis al ili mian poŝtadreson kaj veturis hejmen. Verŝajne la adreso vagis en la militendaro kaj trafis manojn de iuj soldatoj. Rezulte post kelkaj monatoj mi ricevis de iu soldato leteron, kiu komenciĝis per frazo "saluton kara junulino Fima". La afero estas

en tio, ke mia germandevena familinomo ne montras sekson. Ankaŭ la karesnomo Jeĉjo en la rusa estas Fima, uzata de viroj kaj virinoj.

Do mi iom korespondis, portis fiere la verdan steleton, sed la lingvon posedis malbone. Mi memoras, ke iam venis al E-klubo kaj la unua demanda frazo en Esperanto timigis min.

Aktiva esperantisto mi iĝis nur post fino de la universitato, kiam eklaboris en uzino en apudmoskva urbo Kolomno. Mi memoras, ke unuan vesperon, kiam mi venis en komunloĝejon de la uzino, mi rimarkis ĉe la lito de unu el la kunloĝantoj lernolibron de Esperanto. Mi tuj vekis lin kaj pride mandis. Klariĝis, ke li kun kelkaj aliaj inĝenieroj decidis lerni la lingvon. La kunloĝanto nomiĝis Ivan Davidkin, li estis elektronikisto, tre edukita homo. Kiam ili eksciis, ke mi korespondas per Esperanto, ili enmanigis al mi la lernolibron kaj petis instrui al ili. Baldaŭ ili veturigis min al moskva E-klubo. La unua esperantistio, kiun mi renkontis tie, estis artisto Nikolaj Rytjkov, martiro de Esperanto, kiu 18 jarojn pasigis en koncentrejoj, kien trafis en 1937, kiam estis komsomolestro de teatra instituto.

En sekva, 1962-a jaro, mi kun la novbakitaj esperantistoj decidis organizi E-kursojn en la urbo. Ni ricevis permeson de la uzina partia komitato eldoni afiŝon pri Esperanto kaj atendis ĝian aperon el presejo. Oni longe nenion diris al ni pri ĝi, sed hazarde ni eksciis ke ĝi delonge kuŝas en la urba biblioteko, sed la urba partikomitato decidis ne permesi al ni propagandon de Esperanto. Tial ni venis al la biblioteko kaj mensogis, ke oni sendis nin preni la afiŝojn. Samvespere ni dispendigis ĉiujn afiŝojn en la plej vizitindaj lokoj de la urbo kaj komencis prepariĝi al la prelego, kies loko kaj tempo estis anoncitaj en la afiŝoj. En tiu tempo mi ankoraŭ ne povis paroli esperante, sed multe legis E-gazetojn. Ĉion, kion mi povis elsuĉi el la gazetoj pri la lingvo kaj movado, mi naŭve rakontis dum la prelego. >>>

Krome mi invitis el Moskvo la artiston Nikolaj Rytjkov, kiu bele kontribuis per deklamado. La aranĝo daŭris 5 horojn(!) kaj neniu el la 500(!) aŭskultantoj forlasis la halon. Mi ankaŭ memoras, ke instruistino de angla lingvo de unu el la lernejoj venis kun la tuta klaso.

Sekvamaten komenciĝis registrado al E-kursoj. Kiam la nombro de la dezirantoj atingis... 300, ni ĉesis la registradon kaj decidis organizi 3 E-kursojn: la urban, en la uzino kaj en la lernejo. La uzinan decidis gvidi mi, en la lernejo Ivan Davidkin kaj al la urba ni invitis du moskvajn esperantistojn, al kiuj promesis pripagi kaj la vojon tien-reen kaj la instruadon. Ili unufoje veturis elektrotrajne dum 2 horoj, instruis, revenis... kaj rifuzis. Rezulte mi estis devigita ekinstrui ankaŭ en la urba kurso. Post kelkaj lecionoj komenciĝis neklarigeblaj eventoj. Ĉiuj kolektiĝas por vica leciono, sed la ejo (kutime ĝi estis legejo) estas fermita aŭ oni je iu preteksto diras, ke ne plu eblas disponigi ĝin al ni. La samo okazis en la uzino, kie ni kelkfoje ŝanĝis la ĉambretojn ĉe diversaj uzinaj laborejoj. Bal-

daŭ ni komprenis, ke tio estas "mano de KGB" (Komitato de ŝtata sekureco).

Pro la malfacilaĵoj ni ĉiufoje perdis po kelkaj kursanoj. Feliĉe baldaŭ komenciĝis varma aprilo kaj ni lokiĝis sur ŝtuparo de stadiono. Ankaŭ ĉi tie aperis obstakloj (komenciĝis tre laŭta, surdiga muziko), sed post kelkaj lecionoj la surdiganto verŝajne laciĝis kaj ĉesis malhelpi.

Por gvidi la kursojn mi uzis konatan bonegan lernolibron "Praktika kurso de Esperanto por angle parolantaj landoj". Fine de la kurso mi jam scipovis paroli esperante, ankaŭ la plej bonaj el la kursanoj. Kaj preskaŭ tuj post la kurso mi veturigis 7 kursanojn al la 4-a Balta Esperanto-tendaro, kiu okazis en urbeto Cesis (Latvio). Tiel komenciĝis mia aktiva E-agado. Tio estis jaro 1962.

Poste en Kolomno aperis aktiva junulara E-grupo, mi komencis verki kaj traduki al esperanto kantojn, partoprenis kreon de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) – estis unua gvidanto de ĝia kultura fako. En la 1974-a mi revenis al mia naskiĝurbo Jalto kaj fondis tie junularan E-grupon "Tero" (kurtigo de "Turista Esperanto-

Rondo") ĉe jalta klubo de montgrim-pantoj, kiu poste fariĝis urba Esperanto-klubo "Tero". Sekvajare ni festos 30-jariĝon de la klubo.

Dum 44 jaroj de la aktiva agado Esperanto fakte estis por mi vivmaniero. Dank' al ĝi mi estis inter la unuaj petveturantoj, fariĝis turisto, tradukanto kaj aŭtoro de E-kantoj, organizanto de la internacia kanta E-festivalo, E-jurnalisto kaj lastatempe esploranto pri agado de E-pioniroj (rezulte en centro de la urbo aperis du memortabuloj omaĝe al famaj E-pioniroj).



Memortabulo omaĝe al d-ro Ostrovski, unu el pioniroj de E-movado en Jalto.

Velura sezono arta Esperanto-festivalo en Jalto, Krimeo



La unua festivalo okazis en 1979 jaro, en arbaro apud Jalto. Mi memoras, ke inter la partoprenantoj estis kantistoj Andreo Peĉonkin el Krasnojarsk, Leonid Borisov el Kolomno kaj A.Ŝilo, kiu prezentis teatraĵeton "Juĝ-proceso". Sekvaj du festivaloj okazis ankaŭ enarbare, sed ĉe loketo Foros.

En 1981 jaro la junulara E-grupo "TERO" (Turista E-Rondo) fariĝis la urba E-klubo "Tero" kaj ekde tiu tempo aperis ebleco organizi la festivalon oficiale, enurbe sub la nomo "Internacia semajno de amikeco".

La festivalo estis unu el la plej popularaj E-aranĝoj en la eksa Sovetunio. Ĝin partoprenis esperantistoj el multaj respublikoj (plej multe el Ukrainio, Rusio, Litovio, Kartvelio), inter kiuj estis muzikistoj, artistoj kaj ŝatantoj de E-kantoj. En la 1982-a dum "Velura Sezono-4" centoj da esperantistoj grimpis al ebenaĵplato Beŝ-Tekne, kie en kaverno "Tatjana" aŭskultis Baĥ-koncerton. Speciale por tio ni motorcikle liveris tien orgenon. Unufoje en historio de Krimeo okazis simila aranĝo, informoj pri ĝi aperis en tutlandaj ĵurnaloj (sed sen vorto "Esperanto").

Multaj E-artistoj fariĝis laŭreatoj de la festivaloj: Leningrada E-teatro (A.Iovlev, G.Rudenko, O.Popkov, N.Lavrov), reĝisoro de Kieva pupteatro Sergeo Jefremov, ŝomart Amzeev, Vladimir Soroka, Mikaelo Bronŝtejn, Anatolij Radajev, Mikaelo Povorin, Marina Korotj, Natali Berce, Leonid Borisov, V.Fortuŝnij, Dajva Medzeviĉute, Tim Sobakin (V.Ivanov), kaj multaj aliaj.

Multaj E-muzikistoj interkonatiĝis dum la festivaloj, kelkaj eĉ transloĝiĝis al Jalto kaj ĉe la E-klubo

aperis bonega E-ensemblo gvidata de Vladimir Soroka. En la 1986-a ĉe la klubo aperis la unua urba barda klubo "Tero", unusola en la lando barda klubo, kie aŭtoraj kantoj sonis en diversaj lingvoj.

"Velura Sezono-9" estis la lasta, la festivalo renaskiĝis nur post 16 jaroj. Sed ĝi havas jam alian vizaĝon. Ĝia ĉefa celo iĝis propagando de Esperanto por loĝantoj de Jalto kaj ties multenombraj turistoj, ĉar aperis multaj novaj eblecoj. La koncertoj okazas en la granda halo de la urba kulturcentro kaj sur la ĉefa placo, pri kiuj surstrate anoncas grandaj afiŝoj. Krome okazas improviziaj koncertoj sur la kajo cele allogi homojn al la koncertoj en la halo. Dum la koncertoj ni disdonas flugfoliojn. Dum la festivaloj nepre okazas gazetaraj konferencoj. Jam dufoje la festivalon partoprenis JoMo (Jean Marc Leclerc, Francio), pasintjare - pioniro de esperanta rok-muziko Kim Henriksen.

La sekvajara "Velura Sezono" okazos ekde la 22-a de junio ĝis la 1-a de julio 2007. Ĝi estos jam ne kanta, sed arta.

Karaj legantoj! Ĉi tie, kiel kutime, ni prezentas al vi gaston de nia rubriko de krea flanko kaj vi povas legi lian originalan rakonton.

Jefim Zajdman [Jalto, Ukrainio]

Enkonduko

— Ĉu vi ŝatas verkojn de Jack London? - demandis min iam amiko.
— Tre! - respondis mi tuj.
— Ankaŭ mi - diris mia konato, - tamen...
— Kio "tamen" ?- ekkris mi.
— ...Tamen malnoviĝis li iom, necesas lin redakti kaj modernigi. Jen mi tra-legos al Vi.

Legendo pri Kniŝ

Antaŭnelonge en Odeso ĉe la varma suda bordo loĝis Boĉjo Kniŝ. Boĉjo estis komprenema knabo, sana kaj forta. Krom tio li lernis en mezlernejo. Unu knabo en lia korto havis motorbiciklon. De tempo al tempo li permesis al la amikoj preni ĝin. Ankaŭ Kniŝ unufoje petis ĝin por veturadi tra la korto, sed tiu rifuzis doni. La korta knabaro same estis kontraŭ.

— For lin! - ekkriis la pli aĝaj knaboj. — Prenu tiun ĉi knabeton kaj enlitigu lin. Tro junas li ankoraŭ por motorbiciklo.

Kniŝ ne ektimis. Li trankvile atendis ĝis (tiu tempo, kiam) ĉiuj ek-silentos.

— Mi baldaŭ havos mian propran motorbiciklon, eĉ motorciklon, - trankvile diris li, - kaj ĉiuj en la korto havos eblecon ĝissate veturadi.

— Ekde kiu tempo beboj komencis instrui nin, virojn, vivi? - laŭtege demandis komsomolano Buldiga, kiu tiuvespere, kiel kutime, kartludis en korto. Kniŝ eksaltis.

— Aŭskultu min, Vi, viroj-ekskriis li,- Neniam mi parolos kun iu el Vi, neniam. Nur post kiam Vi venos al mi kaj diros: "Parolu, Kniŝ, ni volas, ke Vi parolu".

Per rido kaj moko akompanis la knabaro lin, kiam li iris hejmen. Sed li kunpremis la dentojn kaj silente foriris, rigardante nek dekstren, nek maldekstren.

Sekvatage li direktis sin ien en la urbo. Tiuj, kiuj vidis lin, rimarkis, ke li kunprenis aron da malnovaj jur-

nalaj kaj ujon por rubo. Kaj multe oni parolis kaj multe ridis ĉi-rilate. Ankoraŭ neniam okazis, ke kontraŭ aro da paperaĉoj kaj rubo oni povus aĉeti motorbiciklon, des pli motorciklon. La pli aĝaj knaboj nur balancis perkape kaj silentis, kaj malpliaĝuloj rigardis lin komplete. "Li baldaŭ revenos", - parolis ili.

— Iru li. Estu tio bona leciono por li - parolis la pli aĝaj, - li revenos baldaŭ silenta kaj obeema, kaj vortoj liaj estos humilaj. Jes, ĝi estis stulta ideo. Sed pasis tago, kaj dua, kaj tria, ĉiuj jam komencis forgesi pri la incidento, kiam je kvara tago li alveturis motorcikle. Kaj iom poste oni alveturigis por li magnetofonon kaj gitaron.

En la korto oni komencis paroli pri ŝtelado. Komsomolano Buldiga ekde tiam ne tiom kartludis vespere, kiom kaŝobservis la knabeton, sed vane.

— Oni kulpigos Vin je ŝtelado, - minace diris unutage la posedanto de motor-biciklo.

— Kiu povas kulpigi min je ŝtelado, - trankvile respondis Kniŝ, - Vi simple envas min. La konkuranto foriris honte kaj eĉ la etuloj ridis al lia dorso. Sed iutage, kiam Kniŝ alveturis per la motorciklo en moderna sporta vesto, la pacienco finiĝis. Oni invitis lin al la plej bona loko - al la tablo sub la arbo, kie kutime la plej gravaj homoj sidadis, kartludis kaj drinketis "je triopo".

— Vi devas klarigi al ni ĉion, ho Kniŝ. Diru, kiel Vi ricevas ĉiujn tiujn bonegajn aĵojn. Ĉu ne per ŝtelado? - demandis onklo Ivaĉjo, kiu okaze de

la tiom grava afero estis preskaŭ malebria. Kniŝ levis supren la okulojn kaj ekridetis.

— Ho ne, onklo Ivaĉjo! Ŝtelado ne estas inda afero por lernanto. Mi nur elpensis metodon, kiel facile gajni per la loterio. Ĝi estas lertaĵo, sed ne ŝtelo. Ekstis longa silento.

— Kaj ĉu Vi... Vi rakontos al ni, ho, Kniŝ? - demandis fine onklo Ivaĉjo per tremanta voĉo.


— Jes, mi rakontos. Estas tre simple. Vi prenas pasintjarajn ĵurnalojn kun rezultoj de la loterio kaj dispendigas ilin en tago, kiam aperas rezultoj de la nova loterio, sur dommuroj en necentraj stratoj. Apude starigu ujojn por rubaĵo. Kutime homoj ne rigardas daton de la ĵurnalo, kontrolas siajn biletojn kaj, vidinte ke ne gajnis, forĵetas ilin en la rubaĵojn. Vespere mi ĉirkaŭiras la "kaptilojn", kolektas la forĵetitajn biletojn kaj kontrolas ilin kun helpo de la vera ĵurnalo. Estas tre simple.

Kaj onklo Ivaĉjo ekkriis: - "Ho!"

Kaj komsomolano Buldiga diris: - "Ha"! Kaj ĉiu diris siamaniere, sed ĉiuj komprenis.


Tiel finiĝas legendo pri Kniŝ, kiu vivis en Odeso ĉe la varma suda maro. Kaj ĉar Kniŝ agis per lertaĵo, sed ne ŝtelo, li iĝis la plej estimata persono en la korto.

Nu kiel? - demandis min la konato, fininte legi, - ne estu tro severa, ĝi estas mia unua traduko. Nun mi plimodernigas romanon "Anna Karenina" - estos grandioze!



Bill Thorne
[Londono, Britio]

Sur tiu ĉi paĝo vi povas legi kolektitajn poeziajn verkojn de niaj legantoj, kiuj bone reflektas somerajn impresojn de la aŭtoroj.



Leszek Jękowski,
tradukis: **Bogusław Sobol**
[Bydgoszcz, Pollando]

Poŝtkarto el Italujo

Ne estis Vi suna somero
en la grajnoj de la plaĝo en Rimini
sendefendaj en la spiro de Adriatiko –
disŝutataj ĝis nostalgio
rememoroj de Viaj nudpiedoj
de antaŭaj jaroj...
Ne estis Vi en la antika brilo
kaj en la ombro de bizancaj preĝejoj de Ravenna
- per la oro kaj verdaj mozaikoj
kiel la printempaj tapiŝoj de la majstra mano tek-
sitaj.

Rigardante imperiestran sekvantaron de
Justynian
en San Vitale
mi fiksaŭskultis vane la eĥon
de Viaj leĝeraj paŝoj...
Ne estis Vi sur la montetoj
de la sanktaj ŝtonhakistoj en San Marino
per la kastelturoj de fortreso proksimigantaj
vestiblon de la ĉielo de persistemaj piedirantoj.
Sur *Piazza della Liberta*
malheliĝanta aromo de *cappucino*
permesis por la momento ripozon
por lacaj okuloj –
de la amaso de turistoj kaj memoraĵoj.
Ne estis Vi en la romantikaj
sveltaj gondoloj en Venecio.
Vicoj de malĝojigitaj palacoj kaj domoj
malrapide enirantaj en balanciĝantan
fluan en Granda Canale...
„La plej bela salono de la mondo” –
plu altiras objektojn de fotoaparatoj
en la centra arkado
de baziliko San Marco
pere de kvar origitaj rajdocevaloj sen rajdistoj...
Al la aĵuraj arkoj de la gotik-venecia
beleco antaŭjarcenta
por momento de la kontemplado kaj rememoroj
invitis dignoplana Doĝa Palaco.
Ne estis Vi inter la veneciaj kolomboj
atendantaj panerojn
el Viaj iam amike malfermitaj
manoj...
Hodiaŭ mi ne memoras – jam mi ne scias
al kiu mi volis sendi la koloran poŝtkarton,
la sunajn salutojn –
per la nostalgio de la pentrita pejzaĝo
de la italaj urboj
de tiu aŭgusta somero...

Nikolaj Neĉajev, [Irkutsk, Rusio]

Du someroj en unu jaro

Mi travivas du somerojn en unu jaro. Ĉu tio eblas? Jes, mi ne devas veturi al sudo milojn da kilometroj. Ja dua somero apudas. Mi rakontu pri tiuj du someroj.

La unuan someron mi travivas kutime en julio. Tage estas tridek gradoj, nokte - dudek. Sed jam en aŭgusto nokte malvarmetas kaj fojfoje eĉ frostetas. Tage someras, sed nokte jam aŭtunas.

En aŭgusto mi veturas al la lago Bajkalo, kiu situas sepdek kilometrojn for de mia hejmloko Irkutsko, kaj tie ĝuas la duan someron. Pro kio okazas tiu miraklo? Sur la maro glacio degelas en printempo malpli frue ol ĉe Irkutsko kaj tial junio kaj julio estas malpli varmaj ol ĉe Irkutsko. La maro iom post iom iĝas pli varma kaj en aŭgusto donacas al la bordo la plej varman sezonon. Mi povos denove diri en aŭgusto: saluton, somero!

Banado en rivero

Ombro salika freŝecon protektas,
Miajn piedojn mi tien direktas.
Mia sangfluo pro suno ekbolas,
Trempi la korpon en akvon mi volas,
Volas per freŝo varmegon estingi,
Pacan ripozon somere atingi,
Dronas enuo en tiu banado
Kore ekvivas lirika balado.

Septembro

Ĵetis al mia piedo
flavan folion venteto.
Venas lirika posedo
kore maturas poeto.

Tiu minora monato
melankolion donacas.
Tempo varie kolora
koron poetan kuracas.

Luiza Carol estas, israela verkistino. Ŝi verkas poezion, prozon, kantojn, porinfanan literaturon en la rumana kaj la angla lingvoj, ŝiaj verkoj estis publikigataj en Israelo, Rumanio, Usono, Britio, Germanio, Ĉinio, Japanio.

Luiza Carol estas lernantino de perfektiga kurso de Boris Kolker. Tiu ĉi originala fabelo estas ŝia unua verko en la internacia lingvo, kiun ŝi verkis, plenumante lecionon el "Vojaĝo en Esperanto-Lando".

Luiza Carol [Kiriati-Yam, Israelo]

La insulo de la anseroj

Antaŭ longe, ĉe la mezo de oceano, troviĝis malgranda ŝtona insulo neloĝata de homoj. Tre malriĉa estis la insulo, preskaŭ dezerta: sen arboj, sen bestoj, sen insektoj. Eĉ fiŝoj aŭ ostroj ne vivadis proksime de ĝia bordo, kaŭze de iu speco de rara algo, kiu ĉirkaŭis ĝin.

Foje, laca aro de sovaĝaj anseroj hazarde tranoktis sur la insulo. Kaj ili surprize malkovris... ke ili povas kaj ŝatas manĝi tiun algon! Ili tiom ŝatis tiun ĉi novan manĝaĵon, ke ili prokrastis daŭrigi sian vojaĝon. Evidentiĝis, ke sur la insulo estis bona vetero, ĉiam printempo... Ĉasistoj ne estis, vulturoj ne estis, aliaj birdoj ne estis... "Ĉu ni vere estas la solaj estaĵoj por kiuj tiu ĉi algo estas manĝebla?" demandis sin la anseroj. Kaj, ĉar ili ne povis respondi al tiu demando, ili decidis ke estus plej bone, se ili nenion dirus al aliaj pri tiu insulo kaj la mirinda manĝaĵo, troviĝanta tie. La anseroj konstruis nestojn sur la insulo, kovis ovojn kaj elkovis idojn. Jaroj post jaroj pasis tiel, kaj la anseroj tute forgesis vojaĝi en aliajn lokojn. Tamen, ĉar ili estis speco de vojaĝantaj anseroj kaj multe vojaĝis ĝis tiam, ili kutimiĝis rakonti al siaj idoj pri siaj antaŭaj travivaĵoj. La idoj kreskis, elkovis siajn proprajn idojn kaj rakontis al ili la samajn rakontojn ree kaj ree.

Kiom da jaroj pasis tiel? Oni ne scias, ĉar la anseroj ne uzis kalendarojn. Eble jardekoj, eble jarcentoj pasis... Ĉiuvespere, antaŭ ol ekdormi, la anseridoj postulis rakontojn, kaj la rakonto kiun ili plej ŝatis estis la rakonto pri la urbo Romo. Maljuna viransero kutimiĝis rakonti ĝin per malalta voĉo. Li rakontadis pri la belega urbo Romo, kie la homoj konsideris la anserojn kiel sanktajn birdojn, apartenantajn al fortega diino. Li rakontadis pri la belaj temploj, kie oni loĝigis la anserojn en Romo, kaj pri la bongusta manĝaĵo per kiu oni manĝigis ilin. Li rakontadis pri la malamikoj, kiuj volis detrui Romon dum unu nokto, sed malsukcesis fari tion nur danke al la anseroj, kiuj vekiĝis kaj kriante vekis la gardistojn... Kaj kiom danka estis la loĝantaro de Romo al la anseroj post tiu ĉi okazaĵo! Li rakontadis kaj rakontadis... dum la anseridoj kaj iliaj gepatroj suspiradis dirante: "Bona estas Romo, sed tre malproksima de nia domo..."

Tago post tago pasis tiel, monato post monato, jaroj post jaroj... kaj fin-fine la anseraro de la insulo decidis vojaĝi al Romo. Ĉu ili enuiĝis pri sia monotona dieto en la insulo kaj volis gustumi alian manĝaĵon? Ĉu la vojaĝemo de iliaj prageavoj vekiĝis en iliaj animoj? Oni scias nur, ke unu frumatenon la ĉielo super Romo kovriĝis per bruemaj sovaĝaj anseroj. Ili alteriĝis sur stratoj kaj parkoj, sur tegmentoj de mirindaj preĝejoj kaj apud skulptitaj fon-


toj. Ili gakis kaj ege ĝuis la eksterordinaran belecon de la urbo.

Tamen, la loĝantaro de Romo ne estis tiom gastema, kiom la anseroj antaŭpensis. Aŭtistoj hupis al ili, knaboj ĵetis ŝtonojn al ili, hundoj bojis al ili, katoj atakis ilin... Kaj... kie estis la feliĉaj sakraj anseroj de la temploj de Romo? Jes, kie ili estis? Ho, ve! Anseroj ja troviĝis en Romo, sed nur en restoracioj! Ili servis kiel rostaĵoj sur teleroj! Ho, ve!

La anseroj seniluziĝis kaj laŭte ekkverelis inter si, kulpigante unu la alian pri la decido fari tiun vojaĝon. Ili tiom bruis, ke la homoj ege koleriĝis. "Tiu anseroj bruas kaj malpurigas la urbon", - ili diris. En la urbodomo de Romo la urbestro konvenis por preparoli la aferon. Malalta, dika komizo en la urbodomo, kiu estis pasia ĉasisto, laŭte fanfaronis, ke li povus ĉasi ĉiujn anserojn, se oni permesus al li. Li venis al la kunveno kun sia fusilo, kaj senpacience atendis la oficialan konsenton de la estraro, ke li "savu" la urbon de la ĝenantaj anseroj. En la alta, malvarmeta ĉambro de la kunveno oni parolis, oni balotis, oni skribis dokumentojn, oni tajpis dokumentojn, oni subskribis dokumentojn, oni stampis dokumentojn... Subite malnova kverka ŝranko falis, lampoj fendiĝis, seĝoj glitis, homoj kriis... Granda ansero eliris el la ŝranko, trapasis la ĉambron kriegante, elflugis tra la malfermita fenestro...

"Mia fusilo! Mia fusilo!", - laŭte diris la dika komizo kaj provis eltiri la fusilon el sub la kverka ŝranko. La fusilo neatendite pafis, la komizo falis kaj ege vundiĝis je la nazo. Kiam li sukcesis preni la fusilon, la ansero estis jam malproksime kaj la komizo mistrafis ĝin. "Ha, ha! Li celis anseron kaj trafis aeron!" - la kolegoj mokis lin. Interterpe, la granda ansero kriis al siaj gekunuloj: "Forflugu ni, forflugu ni!", kaj la tuta anseraro deteriĝis kun granda bruo. La komizo ree provis pafi, sed estis malfrue: la anseraro jam estis sur sia vojo hejmen.

Lacaj kaj malsataj estis la anseroj, kiam ili atingis sian insulon. Kiom bongusta ŝajnis al ili nun ilia kutima algo! Kaj kiom agrablaj ŝajnis al ili nun iliaj malriĉaj nestoj! "Bona estas Romo, sed pli bona estas nia domo!" diris la anseroj. Kaj ekde tiam, ili kutimas rakonti al siaj idoj tiun ĉi rakonton.



Nadejda Voroncova [Kurgan, Rusio]

Pyhälä Raita vi jam konas kiel aŭtoron laŭ publikajo "Ĉe la manĝujo de birdoj" en la unua ĉi-jara numero de "K". Nun en du sinsekvaj numeroj vi povas legi ŝian psikologian novelon, originale verkitan en Esperanto.

Pyhälä Raita

[Lestijärvi, Finnlando]

La du edzinoj

Estis ĝene, ke la du sinsekvaj edzinoj de Stefan preskaŭ same nomiĝis. Ne malofte oni ne sciis, pri kiu oni parolis, kaj en malgranda vilaĝo kaj inter la paren-caro tio estis konfuza. Rigja estis la nomo de la unua, amatino de lia elburĝonanta juneco. Ili geedziĝis, kiam Rigja jam estis graveda, sed tion ili ne bedaŭris, esperplenaj ili komencis sian kunvivadon. Nur la gepatroj de Rigja dubis. Ŝi estis ilia solfilino dorlotita, ne kutimiĝinta al dommastrumado kaj kun universitata diplomo pri literaturo kaj la gepatra lingvo. Ĉu ŝi adaptiĝos al la kampara vivo? Stefan estis nura terkultivisto en la vilaĝo, en kies lernejo Rigja havis sian unuan postenon. Stefan kaj Rigja tamen vere amis unu la alian, pasie, kaj ŝajnis ke nenio povos disigi ilin. Abundis ĝojo kaj esploro en iliaj rilatoj, ankaŭ en la lito. Rigja estis la floro, la plenumo de la deziroj de Stefan, kaj Stefan per sia bela muskola korpo, inteligento kaj tenero tute konkeris la junan virinon.

Praktikaj malfacilaĵoj tamen estiĝis. Rigja ne sciis kuiri, ne havis multan tempon por la hejmo.

Ŝia lerneja posteno estis lukra, dum Stefan ne havis regulajn enspezojn. Vintre li estis senlabora. Ili decidis do, ke Stefan vartu la bebon, Rigja daŭrigu sian laboron en la gimnazio. Ŝi ja tie estis tre aprezata, kaj ŝia salajro al ili absolute necesis. La gelernantoj adoris ŝin, la sveltan kaj kompreneman instruistinon, kiu inter siaj aĝaj

kolegoj ŝajnis mense la plej proksima al la adoleskantoj. Pli ol unu knabo enamigis en Rigjan, kaj, ĉar ŝia fako estis ĝuste la gepatra lingvo, ili kelkfoje elverŝis sian koron en la skribaĵoj, kiujn ili devis fari kiel hejmaj aŭ lerneaj taskoj. Tial Rigja multe eksciis pri la pensoj kaj sentoj de la junularo, rimarkis iliajn talentojn kaj korvundojn, observadis ilian disvolviĝon kaj maturiĝon. Ŝi ŝatis individue konsili ilin kaj interparoli kun ili. Estiĝis varmaj rilatoj inter ŝi kaj la gelernantoj, kaj hejme ŝi ofte enpensiĝis, dediĉis sin al la preparado de ŝiaj lecionoj kaj al aliaj interesoj nehejmaj. La najbaroj scivoleme rigardis la junulojn, kiuj vizitadis la hejmon de Rigja kaj Stefan, sed neniun ili povis kulpigi. Nenio grava vere okazis.

Post kelkaj jaroj Stefano eksentis sin neglektata. Li kuiradis, bakadis, akceptis la gastojn de Rigja, kiu ŝatis inviti ĉiajn gekonatojn kaj paroli kun ili pri aferoj kiuj ne lin koncernis. Li fariĝis bonega kuiristo, sed zorgi pri la ordo kaj purigado de la domo kaj pri la lavado de la vestaĵoj - tio por li estis tro. Li preferis ludi kaj promeni kun la fileto, legi, renkontiĝi kun amikoj en la trinkejo, vagi en la arbaro. Mallaborema li ne estis, sed Rigja komencis vidi mankojn. La hejmo, kien venis ŝiaj invititoj, ne ĉiam estis prezentbla. Ĉi estis centjara kampara dometo, ĉarma, sed bezonus renovigadon.

Somere la ĝardeno estis belega: siringoj, rozoj, pomarboj, sed la necesejo situis malantaŭ la ne plu uzata bovinejo, la akvon ili ĉerpis el puto. Jes, renovigado nepre bezonatis. Ĉiuj najbaroj jam loĝis pli komforte, sed Stefan ne sciis fari konstrulaborojn. Li planadis kultivadon de novaj plantoj, elpensis faciligilojn por la agrikulturo kaj forstado, revis pri ŝipeto, per kiu la tuta familio povus veturi surlage aŭ laŭrivero dum someraj ferioj. Ankaŭ li estis solfilo de siaj gepatroj, dorlotita de panjo, severe limigita kaj punita de patro, plena de sufokitaj revoj kaj nekapabla daŭre okupiĝi pri rutinaĵoj.

La geedzoj ekkverelis. Iliaj idealoj kaj deziroj intermite koliziis. Pro la dumtagaj ofendiĝoj kaj neglektoj, ili ne ĉiam sukcesis trovi la antaŭajn ĝojojn en la lito. Okazis ke la teneraj flustretoj antaŭiĝis per ŝrikoj kaj malbenoj. Fluis amaraj larmoj. Ilia vivo ankaŭ ekonomie malfaciliĝis. Stefan elspezis tro multe, enŝuldiĝis, kaj aliflanke li ne memoris, kiu kaj kiom ŝuldis al li. Li neniam lernis librotendi kaj zorgi pri "bagateloj". Rigja pli kaj pli dediĉis sin al la lerneja laboro, al sinedukado; ŝi ja devis ĝisdatigi siajn konojn pri literaturo kaj ŝanĝoj en la socio. Pli kaj pli karaj al ŝi fariĝis la eksterhejmaj homaj rilatoj, kiujn ŝi havis pere de la lernejo. Tie ŝi estis ĉiam aprezata, tie ne eksplodis kolero kiel inter la hejmaj muroj.



Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

Naskiĝis filino, kiun la patro vartis same kiel la filon. Li vere amis la infanojn kaj faris sian plej bonan por eduki kaj ĝojigi ilin. Precipe dum kristnasko okazis mirakloj: feliĉa kunvivado en la bele ornamita romantika dometo, odoranta piceo el propra arbaro, kandeloj, frandaĵoj bakitaj de la paĉjo, donacoj, surprizoj, pardonemo kaj konkordo. Sed la kristnaska paco ne daŭras. La infanoj devis atesti neeviteblan, iompostioman fremdiĝon de la gepatroj, la pliĝantajn drinkemon de la patro kaj plendojn de la patrino, timigajn kaj bruajn kverelojn, kiujn oni povus nomi ankaŭ bataloj, ĉar dum ili pafiĝis kaj rompiĝis ujaro, mebloj kaj la granda murhorloĝo heredita de la avo. Disrompiĝis la familio, la gedzeco, kiu delonge ĝenis la karieron de Rigja. Fine ŝi postulis divorcon kaj la gefilojn al si, ne al la patro. Post longa kaj korŝira proceso ŝia volo plenumiĝis.

La divorco preskaŭ frakasis kaj frenezigis Stefanon. Li restis sola en la kadukiĝanta domo, kun agroj, ĉirkaŭ kiuj ekkreskis urbo, ne favoranta terkultivadon kaj forstodon. Ĉio ŝajne turniĝis kontraŭ lin, la tuta vivo. Li ne elektis tiun sorton, li heredis ĝin de sia patro, kiu devigis lin fariĝi terkultivisto kaj daŭrigi lian laboron. Diplomajn Stefan ne havis. Neniu dungus lin. La sola laboro, kiun li sciis fari, krom lia escepta kuirarto, estis la terkultivado kaj forstado, kiujn oni nun volis anstataŭigi per industrioj, komerco. La urbo volis konstruiĝi modernajn multetaĝajn domegojn sur la kompoŝtojn kaj rozojn de la geavoj. Kvankam Stefan devis orientiĝi en la novaj malesperigaj kondiĉoj, li iel, malrapidege, elturniĝis. En la plej mizeraj momentoj li kredis je la helpo de la brandobotelo, kiun li uzis kiel sav-flosigilon en la ŝtormoj de la vivo.

La novaj kondiĉoj ankaŭ ne al Rigja plaĉis. Malgraŭ la trankviliĝo



Terjofina Maria [Moskvo, Rusio]

de la hejma vivo ŝi ne estis tute kontenta. La lerneja laboro, la admirado de la gimnazianoj, la aprezado de la kolegoj ne sufiĉis por kontentigi ŝin. Dum longaj solecaj noktoj ŝia korpo sopiris la proksimecon kaj karesojn de Stefan, kaj ŝi kaŝiris al lia ne malproksima domo. Dolĉe-amare pasis la kunaj noktoj en la malnova litego. Stefan ne kapablis rifuzi. Frumatene Rigja ĉiam malaperis. La najbaroj scivolis, klaĉadis, sed ili povis pruvi nek tion nek la malon. Ili kompatis la paron, kiu ŝajnis barakti en nerompeblaj ligoj.

Jardekon poste aperis Rigja. Ankaŭ nun ŝi ne scias, kio igis ŝin iri al la dancejo en luma junia vespero, kiam konvaloj odoris en la bosko kaj freŝa brizo susurigis la betulojn ĉe la akvorando. Kial al la sama dancejo iris Stefan, ne plu juna viro? Tiun vesperon li ne estis ebria, sed lia koro soifis je homaj kontaktoj. Rigja rekonis lin, sciis, ke li antaŭlonge divorcis, same kiel ŝi. Ŝia edzo repudiis ŝin, ĉar ŝi ne naskis infanon kaj ilia domo vane atendis la ridojn kaj paŝetojn de etulo. Al Rigja la nefekundeco fariĝis daŭra piko en la koro kaj hontinda ŝtampo sur la frunto. Ŝi kutimiĝis jam evitadi homojn kaj dediĉi sin nur al laboro en la banko. Ŝin konsolis ŝiaj maljunaj gepatroj, ĉe kiuj ŝi semajnfine retrovis iom da fraŭlina senzorge-

co kaj gajeco. Ĉu hazarde nun ŝi iris al la dancejo, aŭ ĉu kondukis ŝin tien la neŝancelebla Destino? Rigja povis nur moketi sin mem pro tiaj romanecaj fantazioj.

La okulojn de Stefan altiris la timema ne plu tre juna virino. Li invitis ŝin danci, iel li deziris protekti kaj konsoli la inon, li, kiu mem delonge estis senkonsola. Li ne altrudis sin, sed li igis Rigjan senti sin interesa kaj alloga. Ili longe kundancis kaj poste promenadis sur la lagobordo kaj en la bosko preskaŭ ĝis la sunleviĝo. Li milde ŝercadis kaj karesis la buklon ĉe ŝia orelo. Ne estis malfacile interkonatiĝi kaj decidiĝi: ni renkontiĝu denove.

En julio okazis io nekredebla. Rigja, la nefekundulino, la repudiito pli ol tridek-kvin-jara gravediĝis. Unue ŝi ne povis kredi al la diagnozo de la kuracisto. Ŝi jam ĉesis esperi infanon. Kiam la vereco de la novaĵo certiĝis, ŝi sentis sin plenfeliĉa, plenenergia. Komenciĝos al ŝi nova vivo. Nu, la eksedzo eraris. Estis li la kauzo de ŝia imagita nefekundeco, ne ŝi. Ankaŭ ŝiaj maljunaj gepatroj ĝojigis. Nepo aŭ nepino estos bona. Ĉio ŝajnis promesplena, eks-cita.

Karaj legantoj! Jen estas la vica serioza kaj amuza leciono de Johan'-Luko Tortel, per kiu vi povos lerni multon novan.

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Proverboj por komencantoj

Jen du aliaj proverboj kun **Kie** kiel komenco:

Kie estas sufero, estas ankaŭ espero (874) kaj:

Kie regas konkordo, regas ordo (893).

Rimark-ind-as, ke en proverboj Esperanto ofte uzas tiujn tabel-vortojn (kia, kial, kiam, kie, kiel...) en paroj kun aliaj tabel-vortoj (tabel-vortoj: la 45 vortoj de la tabelo kia, kial, kiam... tia, tial, tiam... nenia, nenial, neniam, ktp.); ekzemple:

Kia sufloro, tia aktoro (866), aŭ:

Kion mi ne scias, tion mi ne envias (936).

Tia par-igo varias laŭ la lingvoj; ekz. (ekzemple) en la germana: "Wer will, der kann" (Kiu volas, tiu povas) dum en la franca: "Qui veut, peut" (Kiu volas, povas). Esperanto foje imitas unu, foje alian lingvon:

Kie pano estas, tie musoj ne mankas (892); kaj male:

Kio estas lern-ita, ne estas perd-ita (910)

Ni do estas liberaj elekti; tamen gvidu nin sento de ritmo, de ekvilibro inter la fraz-du-on-oj, ktp.

Male la ripeto de nek estas necesa, kiam ni volas unue diri: "ne" kaj poste: "ankaŭ ne":

Nek en-iro, nek el-iro (1679) aŭ:

Nek help-eble, nek konsil-eble (1681).

Ni notu, ke tiuj du proverboj metafore (image, simbole) signifas preskaŭ la samon: "Jen tuta sen-potenco". Nek devas ĉiam veni post alia nea vorto (ne, nenia, ktp.), neniam sola:

Kapo kun herbo sen guto da cerbo (811):

ni ne povus uzi nek anstataŭ sen, ĉar nek estus sola en la frazo, sen antaŭa nea vort-frato. (La signifon ni komprenis, ĉu ne? Tio aludas personon kun abunda har-aro sed mal-multa prudento:

Eĉ en Parizo herbo ne far-iĝas cerbo (401) Ali-dire:

Kapo majesta, sed cerbo modesta (812)

Ve! Ne mal-multe da tiaj homoj ekzistas, krom en Esperant-ujo, evidente, kie ĉiuj el ni certe havas grandan cerbon...

Sed kial da kaj ne de cerbo? Malgraŭ la proksim-eco de sono, estas granda diferenco: en la kvantaj ideoj, da indikas la en-tenon, de la en-ten-il-on:


Telero da supo estas en-telera likvo-kvanto; telero de supo estas telero por supo, tute ne glut-ebla fajenc-aĵo (krom de foiraj ĉarlatanoj!). Alia proverbo kun da:

Plena glaso da vino, sed kun guto da veneno (1938)

(Atentu pri komplimento aŭ donaco, kiu ĉiam povas al-porti mal-bonon). Da indikas ambaŭ likvojn, ne la ujon. Ĉu ni kaptis la nuancon inter da kaj de?

Ni profitu tiun ĉi demandon, por fine diri, ke **Ĉu ESTAS NEPRE NECESA** en demanda frazo, kiu ne havas alian demando-vorton. Kial? Por klar-igi, ni aŭdu rakonton de nia amiko Claude Gacond, tre konata "Svisa esperantisto". Iun tagon alvenas en La Chaŭ-de-Fonds (fama Svislanda esperantista kler-ejo) Japan-ino kun valiz-ego. En miro, ke ŝi kapablis ĝin treni, kelkaj ĉe-estantoj demandas ŝin: "Vi venis sola?" Ŝi kviete nenion respondas, eĉ al alia tia "demando". Por ŝi tio tute ne estis demando! La "demanda in-tonacio" ekzemple de la hispana lingvo, kiu ne uzas ekvivalenton de ĉu, tute ne estas internacia. Ŝi male tuj respondis, kiam Claude Gacond diris: "Ĉu vi venis sola?"

Do, ĝis retrovo post kelkaj semajnoj, ĉu ne?



Ni hodiaŭ revenu al pli pri-lingvaj aferoj:

Kie estas ĝeno, ne estas festeno

Facile kompren-ebla afero, ĉu ne? Sed ne serĉu la numeron de tiu proverbo: ĝi ne estas Zamenhofa, sed Ŝvarca. Ŝvarca? Jes, Rajmondo Ŝvarco, [Raymond Schwartz], eŭropa esperantisto, estis unu el niaj plej famaj last-jar-centaj verk-istoj (li verkis kaj tradukis romanojn, poemojn, kanzonojn, gvidis Parizan esperantistan kabaredon) en stilo ne-imit-eble vigla kaj sprita. Ni legu de li ĉion, kio falas en niaj manoj; ni tiel amuz-iĝos kaj ĝoje lernos, kiel trafé uzi nian Esperanton. Fakte la proverbo havas francan de-venon: *Kie estas ĝeno, ne estas plezuro*. Schwartz tute prave ŝanĝis plezuron al festeno por la rimo kun ĝeno, tiel farinte sian proverbon pli bela, ol la originalo.

Eĉ ni mem povas krei proverbon, kondiĉe, ke ĝi estos bona. Ekzemple oni povus respondi: "Jes, sed tro da festeno estas veneno!" Hm! Ĉu bona? Ĉiu el ni laŭ-plaĉe decidu...

Betty Chatterjee [Anglio-Danio]

Betty Chatterjee perfektigas sian lingvokonon laŭ libro "Vojaĝo en Esperanto-lando" de Boris Kolker. Ties lernantoj ofte havas taskojn provi verki ion en Esperanto. Plenumante la taskon Betty verkis ĉi tiun eseon, en kiu ŝi tuŝas la aktualan nuntempe problemon pri hegemonio de la angla lingvo kaj sendis ĝin por publikigo en "Komencanto".

La "avantaĝo" paroli angle

Laŭ vi, kial la mondo emas uzi nacian lingvon por interkomunikiĝi anstataŭ pli facila, pli neŭtrala lingvo kiel Esperanto?

Ĉu plaĉus al vi, se la mondo uzus vian gepatran lingvon kiel la internacian lingvon?

Iam, kiam la Katolika Eklezio superregis Eŭropon, la latina lingvo estis la internacia lingvo. Pli poste pro la potenco de Francio, la franca lingvo pligraviĝis. Post tiam pro la potenco de Anglio kaj Usono la angla lingvo anstataŭis la francan. En multe da landoj 'The British Council' (La Brita Konsalintaro) enkondukas kaj la anglan lingvon kaj la oficialan britan kulturon. La neŭtrala lingvo Esperanto ne havas tiajn eblecojn.

La mondo dume ne estas konvikita, ke Esperanto taŭgas kiel lingvo. La plimulto de la homaro eĉ ne scias pri la lingvo. Bedaŭrinde, la malplimulto, kiu scias pri ekzisto de la lingvo opinias, ke tia lingvo estas ridinda afero. Ili opinias, ke mankas al ĝi la kulturo, la vort-trezoro kaj la fleksebleco de "normalaj" lingvoj.

La mondo jam uzas la anglan kiel la internacian lingvon. Tamen foje mi demandas min mem, ĉu la angla vere estas mia gepatra lingvo? Mi klarigu tian strangan aserton.

Kiam mi estis infano, oni nur angle parolis hejme kaj kompreneble en la bazlernejo oni nur angle instruis. Tamen la angla ne estis la gepatra lingvo de miaj gepatroj. Ili preferis forgesi sian gepatran lingvon, kiu estis la jida. La kialoj pro tio estis la doloro de nia genta historio kaj la intenco, ke la gefiloj fariĝu veraj Britoj. Kvankam kaj la patro kaj la patrino bonege parolis angle, la tute natura parolmaniero mankis al ili. Kiam ili koleris pro la malbona konduto ktp, ili jide riproĉadis nin, la infanojn. Kvankam ili havis sufiĉe grandan vort-provizon en la angla lingvo, mankis al ili la ĝusta intonacio kaj la ĝustaj idiomoj. Pro la fakto ke la plej ŝatata literaturo de la patro estis la verkoj de Charles Dickens kaj George Wells, li mem parolis kvazaŭ viktoriaj. Malgraŭ tio la fratoj kaj mi sufiĉe bone lernis la anglan, kio helpis al ni sukcese grimpi la socian ŝtupetaron. Ekde 1972 mi jam loĝas en Danio, kaj mi bezonis lerni la danan. Nuntempe mi havas du lingvojn, kiujn mi bonege parolas. Eĉ nokte mi foje sonĝas angle, foje dane. Tamen mi scias, ke same kiel ĉe la patro, ĉe mi ekzistas lingvaj truoj. Mi ŝercas, ke neniu en Danio dungus min kiel spionon pro la angla akcento. Kaj male, kiam mi estas en Anglio, mi kelkfoje spertas, ke iu demandas min de kie mi venas. Mi ne bedaŭras pri tia situacio, ĉar mi prosperas en internacia mondo.

Mi pardonpetas pro tia longa antaŭparolo, kaj nun mi respondos al la demando.

Ne plaĉas al mi, ke oni uzas la anglan por interkomunikiĝi.


Unue, la angla estas tre malfacila lingvo, kaj eĉ en Danio, kie la ŝtato uzas multe da monrimedoj por angle instrui, malmulte da personoj perfekte parolas la anglan. Unu el la plej malfacilaj aspektoj de lingva lernado estas la intonacio. Amika frazo dirita per la malĝusta intonacio povas fariĝi neintence malmika mesaĝo.

Same kiel Den Drown mi ne volus esti ano de la elito. Mi volus neŭtrale kaj egale interkomunikiĝi kun aliaj mondĉivitanoj.

Mi ne respondecas pri altrudo de la angla kulturo al aliaj, sed mi volus sciigi, ke mi ŝatus egalrajte komunikiĝi kun ĉiuj.


La plimulto de danoj kontraŭe opinias, ke la angla lingvo kaj la angla kulturo estas la plej granda avantaĝo por ĉiu. Tial ĉiuj, kiuj regas la lingvon, devas esti tre respektindaj. Ŝajnas al mi, ke la pensiuloj, kiujn mi angle instruas, emas tro dorloti min nur pro la fakto, ke mi estas el Anglio. Mi tre embarasiĝas pro tio.

La Eŭropa Unio tro multe elspezas por la tradukado. Mi preferus, ke oni alimaniere uzu la monrimedojn; ekz: por la ekologio, por la plibonigo de la infrastrukturo en la novaj landoj-membroj ktp. Laŭ mia opinio, la lingva rivalado inter la plej superregaj lingvoj estas malŝparo de tempo kaj mono. Estus pli saĝe, se oni anstataŭ tio uzus neŭtralan lingvon Esperanton.



Oleg Demjašev [Naberejnije Ĉelni, Rusio]

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Tom el historio de la ĝenro

Ekde la komenco de eldonado de "Komencanto" en ĝi ekzistas rubriko "Anekdotoj", kiu laŭ enketo inter la legantoj estas unu el la plej ŝatataj rubrikoj. Hodiaŭ ni iomete profundigos en historion de tiu populara ĝenro kiel anekdotoj

Anekdotoj – mallonga kurioza aŭ sprita rakonto, ofte biografia.

[el Plena Ilustrita Vortaro]

Sed antaŭe oni nomis anekdotojn tiujn verkojn, kiuj ne estis eldonitaj.

Anekdotoj (franc.: *anecdote*, el la greka *anekdotos* – "neeldonita") – ne-granda ŝerca rakonto de diversspeca enhavo kun neatendita sprita fino.

[el Granda Sovetia Enciklopedio]

Plej ŝatataj herooj de anekdotoj ĉe la antikvaj grekoj estis filozofoj kaj "skolasto" – pseŭdosciencistoj.

*

© *Unu filozofojn oni foje demandis, kio estas la subtera mondo? "Atendu iomete, mi skribos al vi de tie". – respondis li.*

*

© *Sholasto, dezirante ekkuŝi dormi kaj ne havante kusenon, ordonis al sia servisto meti sub la kapon kalikon. Al la vortoj de la servisto: "Ja estos dure!". respondis: "Plenigu ĝin per lanugo".*

En la 6-a jarcento aperis libro de konstantinopola historiisto Prokopio Kesariskij "La sekreta historio", dediĉita al la skandala kroniko de la imperiestra kortegano. Post la apero de tiu libro per vorto "anekdotoj" oni komencis nomi diversajn klaĉojn kaj onidirojn el la vivoj de konataj personoj. Kaj ekde apero en la 14-a jarcento de novelaro de Giovanni Bokaĉo "Dekameron" "anekdotoj" oni komencis nomi kurtajn historiojn, kies celo estis ne instruado kaj edifo de leganto, sed nura distrado. Tiu ĉi ĝenro de anekdotoj rapide disvastiĝis en Eŭropo, komencis aperadi pluraj libroj.

Unu bona anekdotoj egalas al 15 aldonaj minutoj de la vivo, forprenitaj de laboro!

En rusa literaturo la unuaj kolektoj de anekdotoj estis eldonitaj en la 17-a jarcento sub titolo "Ridindaj rakontoj". Unu el la plej popularaj herooj de anekdotoj de tiu epoko estis rusa caro Petro la Granda. Anekdotojn pri li ankoraŭ dum lia vivo publikigis eldonata en tiu tempo angla revuo "Spektator"

*

© *En la parlamenta kunsido, aŭskultante aferojn pri ŝtelado, Petro la Granda ordonis al ĉef-prokuroro Paŭlo Jagujinski: "Tuj skribu en mia nomo ukazon, ke se iu ŝtelos ion por la sumo, kiu sufiĉos por aĉeti ŝnuron por lin pendigi, tiu, sen plia esplorado, estu mortekzekutita per pendigo!" — "Via imperiestra moŝto, ĉu vi volas resti tute sola, sen civitanoj kaj servantoj? Ni ĉiuj ŝteladas, nur iuj malpli, kaj aliaj pli rimarkeble". – rezonis la ĉef-prokuroro. La Imperiestro, aŭdinte tiun originalan respondon, ekridis kaj lulis la temon.*

Kiu elpensas tiujn kurtajn rakontojn kun neatenditaj finoj? Ĉe plejmulto da anekdotoj ne eblas trovi la aŭtorojn. Ŝajnas, ke "anekdotoj" ŝvebas en aero – kiu "kaptis", tiu "elpensis". Tute ne hazarde similaj anekdotoj "materiigas" ofte samtempe en diversaj mondopartoj. Monde konata verkisto-scienc-fikciisto *Ajzek Azimov* eĉ traktis anekdotojn kiel iuj mesaĝoj, kiujn sendas al la teranoj misteraj aliplanedaj civilizacioj, por kontroli nian intelekton.

Kaj tamen trovi "spurojn" de la apero de anekdotoj foje eblas. Ekzemple, de kie aperis serio de anekdotoj pri "Armena radio".

*

© *Armenan radion oni demandas: "Kial iuj viroj estas dikaj, kaj aliaj maldikaj, kvankam ĉiuj el ili manĝis tute samajn makaroniojn?" — "Ĉar iuj manĝis ilin laŭlonge kaj la aliaj – laŭlarĝe". – estis respondo.*

Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

En la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento la plej amasa komunikilo estis radio, en kiu ekzistis tiu ĝenro: respondoj al la leteroj de la aŭskultantoj. Cetere, la demandojn plej ofte elpensadis la ĵurnalistoj mem – por aŭdigi en la radioeteron ideologie korektan respondon. Ĝuste tiam aperis la serio de anekdotoj pri armena radio, evidente pro tio, ke en komenco de la pasinta jarcento estis popularaj tiel nomataj "armenaj enigmoj", kiuj enhavis absurdajn demandojn kaj same absurdajn respondojn. Kaj eblas rimarki, ke ekde tiu tempo, kiam radio cedis sian lokon al aliaj amaskomunikiloj, novaj anekdotoj el serio "Armena radio" ĉesis aperi.

Ekzistas anekdotoj pri konkretaj situacioj, multaj el ili ariĝas en seriojn. Tiel, en Rusio popularas anekdotoj pri "leŭtenanto Rjevskij", brava kaj kuraĝa oficiro, ŝatanto de vino kaj virinoj, al kiu ĉiam okazas diversaj okazintaĵoj. Alia serio aperis pri heroo de civitana milito en Rusio - *Vasilij Ivanoviĉ Ĉapajev* - ĝi populariĝis post la apero en 30-aj jaroj de pasinta jarcento de kinofilmo "Ĉapajev".

Estas populara serio de anekdotoj pri fama detektivo *Ŝerlok Holms*, monde konata heroo de la verkoj de A. Conan Doyle. Antaŭ dudeko da jaroj aperis serio pri tiel nomataj "novaj rusoj" – novaj riĉuloj, kiuj rapide kaj neatendite riĉiĝis, sed restis interne "nerazitaj traboj"...

Ni scias, ke estas en la mondo konataj serioj pri gabrovanoj kaj skotoj, serio "El Stultul' Vilaĝo", ekzistas anekdotoj pri kuracistoj kaj pacientoj. Pri edzoj kaj edzinoj. Pri policistoj. En ĉiuj landoj kaj en ĉiuj lingvoj plejmulto da anekdotoj estas pri kelneroj, ĉu ne?

Karaj legantoj! Ni petas vin rakonti al ni pri anekdotoj, popularaj en via lando. Ni pensas, ke estos vere interese por niaj diverslandaj legantoj scii, pri kio kaj kiuj oni ridas en aliaj landoj. Ni plezure publikigos viajn materialojn sur paĝoj de "Komencanto"



*Anekdotoj pri famuloj
el kolekto de la redakcio*

Spritaĵoj de famuloj

Dum solenaĵo okaze de la 80-jara jubileo de *Winston Churchill* unu el fotojurnalistoj demandis lin:

— Mi esperas, s-ro Churchill, ke vi permesos al mi foti vin ankaŭ en la tago de via 100-jariĝo?

— Tiukaze vi devos dum 20 jaroj tre atente prizorgi vian sanon.

*

Bernard Show estis en kompanio kun konata aktorino, kaj ŝi diras al li:

— *Sir*, se ni kun vi geedziĝus kaj ĉe ni naskiĝus filo, li estus saĝa same kiel vi, kaj bela same kiel mi.

B. Show al tio rimarkis:

— Kaj se okazos male?

*

Foje iu ĵurnalisto demandis *Bernard Show*:

— Kun kio ĉe vi asocias malheleblua koloro?

— Malhele-blua koloro ĉe mi asocias kun idiotaj demandoj.

*

Genrih Heine, fama germana poeto, foje serioze ekmalsanis kaj trafis hospitalon. Lin vizitis malnova amiko, kaj li aperis en tiu momento, kiam la flegistinoj transportis *Heine* sur alian liton.

— Ĉu vi vidas? - diris li, - virinoj ĝis nun portas min sur brakoj!

*

Oni rakontas, ke foje G. *Heine* ricevis per poŝto grandan pakajon. Ene de la pakajo tamen estis nenio, krom malgranda mesaĝo de unu el liaj konatoj: "Mi estas sana".

Post iom da tempo tiu konato ricevis de *Heine* reciprokan sendaĵon. En ĝi kuŝis granda peza ŝtono kaj estis mesaĝo de *Heine*, "Tiu ŝtono forfalas de mia koro, kiam mi ekscias, ke vi estas sana".

Germana filozofo *Kant* diris:

— Kiam mi estis malriĉa, mi ne povis permesi al mi edziĝi. Kiam venis bonstato, bezono edziĝi jam forfalis.

*

Oni rakontas, ke foje konata sovetia aktorino *Faina Ranevskaja* tagmanĝis ĉe sia konatino. La tagmanĝo okazis tiom modesta, ke ŝi ekstaris post ĝi tute malsata. Tamen la mastrino afable diris al *Ranevskaja*:

— Mi invitas vin ankoraŭ iam tagmanĝi ĉe mi.

— Kun plezuro, - respondis *Ranevskaja*, — mi pretas... eĉ tuj!

*

Venis foje fama pentristo *Pablo Pikasso* al Londono kaj sinturnis al polico:

— Iu kanajlo en la stacidmo ŝtelis ĉe mi horloĝon!

— Ĉu vi povas desegni lin?

— Kompreneble. Bonvolu...

Al la vespero la londona polico arestis tri avinojn, unu avon, du busojn kaj kvar lavmaŝinojn.

Kolektis kaj esperantigis **Nekludov Oleg**
[Buzuluk, Rusio]

Pro laco

— Kial vi lasis vian antaŭan laborpostenon?

— Pro laco.

— Pro kiu laco?

— La kolegoj diris, ke oni lacis de mi.

*

Horoskopo

— Ĉu vi veturos hodiaŭ al fiŝkaptado?

— Ne.

— Kial?

— Mi legis en horoskopo, ke hodiaŭ estas favora tago por fiŝoj.

*

Embaraso

— Halo, tio estas fajrobrigadistoj?

— Jes...

— Ĉi tie kuracisto kaj policisto interbatalas kaj mi ne scias, kien telefoni...

Nova birdospeco

Ŝatanto de kolomboj montras al la vizitantoj siajn birdojn:

— Kaj ĉi tie mi kunigas kolombojn kun papagoj.

— Por kiu celo?

— Se kolombo misvojiĝos, li povos iun demandi pri ĝusta direkto...

*

Ne respondu

— S-ro kuracisto, en mia orelo ofte sonas sonoro, kvazaŭ telefona...

— Sed vi ne respondu!

*

Kio vi estas

— Diru al mi, kiujn aŭtorojn vi legas, ka mi diros, kio vi estas.

— Mi legas *Homeron*, *Platonon*, *Sokraton*...

— Vi estas mensogulo!

Sendis **Ildus Garifullin**
[Krasnoufinsk, Rusio]


Fluganta testudo

Malgranda testudo rampas sur la arbon, apenaŭ surrampas sur la branĉon kaj saltas de tie. Dum flugo ĝi vaste etendas piedojn, svingas per ili kaj fine falas surteren. Ekstaras, lamas denove al la arbo, rampas sur la branĉon... Tiu procedo atentigas du birdojn. Unu diras al la alia:

— Aŭskultu, al mi ŝajnas, ke jam venis tempo diri, ke li estas nia adoptita infano.



bildon preparis **Ildus Garifullin** [Krasnoufinsk, Rusio]





Sergej Ĉikaĉev [Magadano, Rusio] lernis Esperanton per koresponda kurso. Li apartenas al tiuj esperantistoj, kiuj lerninte la lingvon, volas praktike apliki sian lingvokonon. Ĉar alia ŝatokupo de Sergej estas petveturado, li starigis antaŭ si la celon: per Esperanto kaj petveture ĉirkaŭiri la tutan mondon. [Ni jam skribis pri li "K"-4-2003]. Dum siaj vojaĝoj Sergej Ĉikaĉev aktive kontaktas kun esperantistoj en diversaj landoj kaj reklamas Esperanton inter neesperantistoj.

Nuntempe Sergej vojaĝas en Sud-Orienta Azio, dum kelkaj lastaj monatoj li trapetveturis Mongolion, Ĉinion, Laoson, Tailandon, Malazion, Singapuron, Indonezion... Mirige ke li petveturis jam ne nur tradicimaniere per aŭtoj, sed ankaŭ per ŝipoj kaj eĉ per aviadiloj!

Ĉi-sube ni prezentas al vi fragmentojn de liaj impresoj pri la vojaĝo en la rezervejo de sovaĝa ĝangalo "Taman Negara", en nord-orienta parto de Malazio.

Kial mi decidis iri al ĝangalo TAMAN NEGARA

Konatoj en Malazio informis min, ke oriente de Kuala Lumpur situas netrairebla sovaĝa ĝangalo "Taman Negara". Tiu ĉi ĝangalo estas la plej antikva sur la Tero kaj eĉ estas traktata de UNESKO kiel natura valorajo de la planedo. La aĝo de tiu ĉi ĝangalo estas 150000000(!) da jaroj. Laŭ vortoj de lokanoj la ĝangalo estas plene sovaĝa, tie ĝis nun loĝas gentoj, kiuj ne havas kontaktojn kun cetera mondo! Mi tre ekvolis vidi ĉion ĉi per propraj okuloj.

Konsilo

... Antaŭ ol iri al la sovaĝa parto de la rezervejo, dezirindas informi lokan policon, kunpreni kun si parangon (tranĉilforman hakilon) por trahaki la vojon kaj revolveron por defendi sin kontraŭ tigroj, panteroj, elefantoj...

Ĝangalo estas tute alia mondo

El la taglibro

Mi trapaŝis dum tago nur 10 kilometrojn kaj decidis noktumi en la tendo. La unua tranokto estis vera turmento kaj ekzameno de mia vivkapablo, kaj morala, kaj fizika. En Kuala Tahan lokaj policanoj rakontis al mi, ke pasintjare kelkaj ĝangalesploristoj el Usono, kiuj havis kun si modernan navigan aparataron kaj startis laŭ tiu sama itinero, senspure malaperis. "Plu ilin neniu vidis", - diris tiu policano, - kaj vi volas iri sola! Freneze!" "Ĝis nun neniu atingis la nord-orientan parton de Taman Negara piede. Tio ne eblas!" - rezonis li.

Sed mi volis esplori malfacile atingeblan parton de la ĝangalo ĝuste en nogd-oriento. Precizaj informoj pri tiuj lokoj mankis, ĉar tie preskaŭ neniu iam estis, tial neniu sciis specifajojn de tiuj lokoj. La vojoj tie mankas. En densa ĝangalo, kien ne penetras la sunaj radioj, tre bone helpas kompasoj, ja orientiĝi per suno ene de ĝangalo tute ne eblas - sunaj radioj preskaŭ ne penetras tra foliaro. Krepuskoj tie ne ekzistas, plena mallumo falas al ĝangalo tuj post sunsubiro, tial estas racie je 1-2 horoj antaŭ la sunsubiro starigi tendon kaj kuiri manĝaĵon.

Konsilo

En tropika arbaro bezonatas kunhavi jodon, bandaĝon kaj "aktivigitan" karbon (por purigi akvon). La plej taŭga speco de ŝuoj en ĝangalo estas sandaloj. Sportaj ŝuoj kaj botoj ne taŭgas, ĉar ili ne tralastas aeron kaj la piedoj tial ŝvitas.

El la taglibro. Popolo Azli

Mi tranoktis unu nokton en la tendo kaj ekmarŝis plu. Post 5 kilometroj mi renkontis interesan vilaĝon de aborigenoj. Tio estis gento "Azli", aŭ kiel ilin nomas malajzianoj "Orang Azli", kio signifas "popolo Azli", aŭ homoj de ĝangalo. Vivmaniero de la gento estas primitiva: oni vivas en lignaj domoj kun pajlaj tegmentoj. En la domoj mankas pordoj kaj fenestroj, estas nur muroj kaj tegmentoj. La vilaĝanoj parolas nek angle, nek malajzie. Mi antaŭvidis tian situacion, tial en Kuala Lumpur mi pre-

paris la reprezentan leteron en malajzia lingvo. Poste en ŝtato Pahang (kie situas rezervejo Taman Negara) mi trovis homon, kiu tradukis la tekston al la loka lingvo. En la vilaĝo ĉiuj estis tre mirigitaj ekvidinte ĉe mi paperon en sia lingvo.

La popolo Azli vivas same, kiel 200-300 jaroj antaŭe, sen elektro kaj aliaj modernaj avantaĝoj. Plejparto el ili neniam estis en civilizitaj lokoj kaj la tutan vivon travivis en ĝangalo.

Manĝaĵon ili kuiras sur lignofajro, manĝas tion, kion donacas naturo - fruktojn, fiŝojn, viandon de sovaĝaj bestoj, fojfoje ili ricevas rizon, kiun oni al ili veturigas per rivero. Sed plej multe min mirigis tio, ke Azli manĝas musojn. Eble por ili tio estas frandaĵo, sed mi delikate rifuzis de la kuiritaj musoj, kiam oni al mi proponis gustumi...

La registaro de Malazio penas aliloĝigi la gentojn en urbojn, sed ili ne volas forveturi el kutimaj lokoj. Ili volas vivi tiel, kiel vivis iliaj praavoj. Multaj el ili ne scipovas eĉ legi kaj skribi!

Impresoj

Travivinte en ĝangalo dum iom da tempo mi komprenis, kial ili ne volas aliloĝigi. En la ĝangalo mankas tumulto, ĝia loĝantaro vivas laŭ siaj propraj leĝoj. Ĝangalo estas tute alia mondo. Trafinte tien vi ne tuj komprenas, kio okazas ĉirkaŭ vi. En ĝangalo regas netransdonebla atmosfero. Ekzistas iu Supera Forto, kiu regas kaj kontrolas ĉion en ĝangalo. Neniam iru en ĝangalon kun pensoj, ke ĝin eblas konkeri. Tio ne eblas! Kun similaj pensoj vi ne travivos en ĝangalo eĉ unu tagon! Ĉi tie vi estas gasto kaj devas al ĉio rilati kun estimo.



Nina Vinnikova [Novolajsk, Rusio]

El la taglibro. Kaŭĉuka plantejo

Pasiginte iom da tempo en la vilaĝo de "Azli" mi decidis iri plu. Abundo de diversaj kreskaĵoj kaj bestoj povas impresigi iun ajn. Tiom da diversaj fruktoj mi neniam vidis! Ĉie kreskas sovaĝaj bananoj, rambutanoj, kokosoj. Sperta homo neniam mortos ĉi tie pro malsato.

La sekvan tagon, irante laŭ vojo, mi al mia miro, ekvidis aŭton. La ŝoforo estis mirigita nemalpli ol mi.

— Saluton! Kien vi iras?

— Mi iras al nord-orienta parto de la rezervejo, al Kampung Gusaj.

— Sed kial vi iras tien per piede?

— Mi estas vojaĝanto. Kutime mi moviĝas petviture, sed ĉi tie aŭtoj mankas, tial mi iras piede.

— Ĉu mi veturigu vin?

— Kaj kien vi veturas?

— Proksimen, nur 10 kilometroj. Mi veturas al mia kaŭĉuka plantejo. Ĉu vi volas rigardi, kiel oni laboras en la plantejo kaj kiel oni produktas kaŭĉukon?

Mi nenion sciis, kiel oni produktas kaŭĉukon kaj kun ĝojo akceptis inviton de mia nova konato.

En la plantejo laboras proksimume 10 homoj. La laboristoj loĝas en ligna barako sen fenestroj kaj pordoj, estas nur muroj kaj tegmento. En la ejo estas kuŝejoj kun kontraŭkulaj retoj. Apude situas manĝejo... En la plantejo laboras plejparte ĉinoj.

— Dekomence ni dungis por la laboro Azli-homojn, - rakontis mia nova konato, - sed poste rifuzis, ĉar laboras ili malbone, instrui ilin al io tute ne eblas. En nia ŝtato estas leĝo, ke oni devas prefere dungi aborigenojn, sed praktike neniu obeas tiun leĝon. Azli laboras nur "laŭ dokumentoj", fakte ja laboras ĉinoj. La averaĝa salajro ĉi tie estas \$700-800, tio estas sufiĉe alta sumo por nia lando. Sed laboro estas tre malfacila, sen ripoztagoj, ne ĉiu povas elteni.

Konatiginte kun vivo en la plantejo mi decidis iri plu.


Post 2 tagoj mi atingis Kampung Gusaj, kie mi vizitis lokan administracion, kies estro ege miris, kiam eksciis, ke mi venis piedepaŝe tra ĝangalo. Mi okazis la unua eksterlandano, kiu atingis ilian vilaĝon! Tiun fakton la estro konfirmis al mi per oficiala papero.

Konkludo

Do, farante konkludojn pri marŝado tra ĝangalo mi volas diri, ke antaŭ ol plani iri tien, milfoje pensu, ĉu vi vere bezonas tion?! Ne estas eksterurbiĝo al naturo aŭ pikniko. Vojaĝoj al ĝangalo povas finiĝi tre plorinde! Mi esperas, ke konsilioj, kiujn mi faris en tiu ĉi rakonto iel helpas al aliaj elvivi en ekstremaj okazoj.

Konkurso "Enigmoj-2006"

Krucvortenigmo "Anguletoj" = 15 poentoj



Viktor Alikin [Permj, Rusio]

Desupre dekstren

1. Kemia elemento Sn; 2. Religia kaj politika suvereno de muzulmanoj; 3. Naĝbirdo kaj hejma, kaj sovaĝa; 4. Tropika arbo; 5. Ĉefurbo de Ĉeĥio; 6. Rapidkura insekto, ofte vivas en kuirejoj; 7. Aroma frukto; 9. Formo de vojo de planedo aŭ kometo; 11. Sankta birdo de la antikvaj egiptoj; 12. Skandinava dio; 13. Ĉefurbo de Egiptio; 14. Trituro; 15. Pli ol kamarado; 16. H₂SO₄, HNO₃... estas

Desupre maldekstren

2. Lando de la lasta 91-a UK; 3. Komenco de batalo; 4. Montara ĉeno inter Eŭropo kaj Azio; 5. Muzikilo kun klavaro; 6. Malgranda akvo-veturilo; 7. Granda mara kankro; 8. Figuro, havanta formon de ovo...; 10. Mara rabobesto kun fortaj dentoj; 11. Okulmembrano; 12. Frukto, kiu liveras bonegan oleon; 13. Subita malbona ŝanĝiĝo dum ŝajna bonfarto; 14. Gento, klano; 15. Io spirita; 16. Reklama folio

Rezultoj de la konkurso el la 2-a numero

Jen estas nomoj kaj gajnitaj poentoj de la konkurso el "K"-2-2006

- 1) Anton Loŝmanov [Komsomolsk-na-Amure, Rusio] — 10 + 9 = 19 poentoj
- 2) Christian Riviere, [Le Mans, Francio] — 10 + 8 = 18 poentoj
- 3) Jackie Huberdeau [Le Mans, Francio] — 10 poentoj

Korektaj respondoj al la taskoj de la Konkurso el "K"-2-2006

Krucvortenigmo "Diagonaloj"

De supre dekstren: 1. Teamo. 2. Trefo. 3. Glano. 4. Kromo. 5. Groto. 6. Tramo. 7. Aboco. 8. Arako. 9. Blino. 10. Pli. 12. Omo. De supre maldekstren: 2. Teo. 3. Gramo. 4. Klemo. 5. Grafo. 6. Trono. 7. Aromo. 8. Abato. 9. Bromo. 10. Placo. 11. Fliko. 13. Ino.

Kio estas superflua en la vico?

destino – ne havas sufikson –in-; **fajrero** – havas sufikson –er-, ĉiuj ceteraj ĝin ne havas; **rememori** – havas prefikson "re-", aliaj ne havas; **esperanto** – havas prefikson –ant- aliaj ne havas; **1916** – ne okazis UK; **malkontento** – aliaj ne havas prefikson "mal-"; **Ĉ** – aliaj estas senĉapelaj; **Hamburgo** – (1962 – UK en Kobenhavn, 1963-UK en Sofio, 1964-UK en Denhaag, 1965 – UK en Tokio, sed ne en Hamburgo); **tomato** – ĉar kukumo, melono kaj kukurbo apartenas al la sama klaso de kreskaĵoj, sed tomato al tiu ne apartenas; **kvardeko** – ĉar estas radiko "kvar-", kiu rekte signifas kvar, en la ceteraj vortoj literoj "kvar" rekte ne rilatas al 4.

Estas interese,

ke Anton Loŝmanov trovis sian kialon de superflueco, ekzemple, *Hamburgo* – li rimarkis, en ĉiuj ceteraj urboj UK-oj pasis po 2-foje, sed en Hamburgo nur 1-foje. La klarigo de nesameco estas alia, sed la respondo korekta, tial la redakcio decidis kalkuli la respondon korekta. En la sekva vort-vico li trovis, ke *kukurbo* estas superflua, ĉar ĉiuj ceteraj vortoj havas po 6 literoj, sed kukurbo – 7, sed tiu ĉi respondo estas nekorekta. Christian Riviere dekomence opiniis, ke *Sofio* estas superflua urbo, ĉar ĝia nomo ne havas etimologian rilaton al "haveno", kiel en tri ceteraj urboj, tamen poste indikis korektan respondon.

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 48-jara kuracisto. Mi volas interŝanĝi pensojn pri la kulturo. **Int:** vojaĝi, vagi en montaro, veturi per kanuo.

Allgayer Klaus
Lindenberg

Germanio

haohao@gmx.de

Mi ŝatas librojn, pentradi, aŭskulti kurt-
ondan radion, lerni lingvojn, astron-
omion. Mi volas konatiĝi kun iu junulino
el okcidenta Eŭropo, Ameriko aŭ
Aŭstralio.

Petrov Maksim

Aksu

Kazaĥio

petrov yermak@mail.ru

Mi deziras korespondi
kun gesamideanoj en
Bulgario, Turkio, UAE, kaj
aliaj najbaroj de Irano.

Rahmani Parviz

Esfahan

Irano

esperanto12@yahoo.com

Mi estas 18-jara knabino, stu-
dentino. **Int:** libroj, muziko,
bestoj. Mi atendas viajn leterojn!

Maria Kuprijanova

Tihvin, 3-36-107,
RU-187550

Rusio

masha55@lens.spb.ru

Mi estas 22-jara studento, mi
eklernis Esperanton antaŭ unu
jaro, sed mi neniam vere uzis
ĝin. Mi deziras korespondi tut-
monde kun ĉiuj pri ĉiuj temoj.
Int: lingvoj komputilscienco.

s-ro Gräbener Tristram
Helsinki

Finnlando

tristramg@gmail.com

Mi ŝatas korespondi kun samid-
eanoj el la tuta mondo.

s-ino Maria do Carmo
Silva

Av. Beberibe, 2616/202A
- Fundão - Recife -
PE - Cep. 52130-000

Brazilo

karmja@ig.com.br

Mi estas 17-jara junulino el
norda regiono de Hispanio. Mi
ludas klameton en konservatorio
kaj deziras korespondi kun
samideanoj, kiuj ankaŭ ludas
klameton. Se vi ludas klameton,
bonvolu skribi al mi!!! Mi volas
interŝanĝi partiturojn, precipe por
grupoj de klametoj. Tre interesas
min muziko de aliaj landoj.
Skribu paper-poŝte, ĉar mi ne
havas ret-adreson. Amike aten-
das viajn leterojn.

Paula Saiz de Omeñaca
Tijero,

Colonia Universidad N24,
39110 Soto de la Marina,
Cantabria

Hispanio



Mi estas 13-jara lemano. **Int:**
kulturo de aliaj landoj, amikeco,
muziko. Mi deziras korespondi
kun gesamideanoj el Eŭropo,
sed ankaŭ el la tuta mondo. Mi
kolektas poŝtmarkojn. Mi
atendas viajn leterojn.

Norbert Patti
via Colombo, 156 -
Valguarnera

Italio

Mi estas 69-jara pensiulino,
flegistino. **Int:** lingvoj, kutimoj,
religioj, reinkarnacio. Mi ŝatus
korespondi kun pensiuloj, ne nur
per retpoŝto.

Marta Romanowska
Rayskiego7/4 70-426
Szczecin

Pollando

martarom@o2.pl

Mi estas 38-jara komencantino
kaj volas korespondi. **Int:** kultu-
ro, filozofio, sciencoj, spiritisma
religio, poŝtkartoj. Mi tre volas
konatiĝi kun aliaj esperantistoj.

Solange Nóbrega Bezerra
Rua Domingos Amado, 3441,
Candelária, Natal, RN,
Br-59065-470

Brazilo

snobregabezerra@yahoo.com.br

Mi estas 52-jara infana gardis-
tino, komencantino. **Int:** plediri,
asocia vivo, naturo. Mi volas
ekrilati kun homoj tutmonde.

Claude Lete
132 rue des Poissonniers
Hall, 6-1,
75018, Paris

Francio

LClete@aol.com

Mi estas 30-jara elektronika in-
ĝeniero, volas korespondi kun
esperantistoj, kiuj havas similajn
interesojn. **Int:** ludoj (tablo-ludoj
kaj videoludoj), kino, literaturo
(aparte sciencfikcio kaj fan-
tazio). Mi preferas korespondi
retpoŝte, tamen ankaŭ volonte
respondos paper-poŝte.

Andres Marin

Heredia

Kostariko

sordros@gmail.com

Mi estas 58-jara oficisto, kiu
volas korespondi kun homoj el la
tuta mondo. **Int:** E-o, libroj,
legado, kuirartoj, psikologio.

s-ro Russell Watkins

4075 Fair Oaks Drive
Franklin,
Indiana 46131

Usono

rucjo@yahoo.com

Mi estas 49-jara inĝeniero. **Int:**
moroj, naturo, vojaĝoj. Mi estos
tre feliĉa, se al mi skribos iu el
Germanio kaj Britio. Poste mi
pretas interŝanĝi vizitojn.

Stanislovas Raulynaitis
Sodu 111, Jurbakas,
LT-4430

Litovio

raulynaiciai@one.lt

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

